# *Díaz-Canel gratulas la gajnintojn de la Komunuma Kultura Premio*

*Image not found or type unknown*

Havano, feb 1 (RHK) Kuba prezidento Miguel Díaz-Canel Bermúdez hodia? gratulis la gajnintojn de la Nacia Premio por Komunuma Kulturo en sia oficiala Tvitera konto.

„Hiera? ni ?eestis la transdonon de la Nacia Premio por Komunuma Kulturo, kiu estis donita al la poeto Luis Cordero, la Grupo tradici-Portanto 1802 kaj la Projekto @QuisicuabaC, kiuj dedi?is sian tutan vivon al tiu malgranda patrujo kiu estas la komunumo. Gratulon al ?iuj".

En la evento okazinta anta?tage en la Kulturdomo Joseíto Fernández  en Centro Habana ?eestis anka? Inés María Chapman, vic?efministrino; Luis Antonio Torres Iríbar, unua sekretario de la Provinca Komitato de la Partio en Havano, la vicministroj pri kulturo Fernando Rojas kaj Kenelma Carvajal; la prezidanto de Uneac, Luis Morlote, kaj Diango González Guerra, prezidanto de la Nacia Konsilio de

Kulturdomoj.

Fonto: Granma

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/312373-diaz-canel-gratulas-la-gajnintojn-de-la-komunuma-kultura-premio

Radio Habana Cuba